

devas alkaki per via muso la ekon de la artikolo (la titolon) kaj konservi la fingron sur la klavo de la muso, poste malsupreniri per via mano ĝis la fino de la artikolo (la referenco al "Ondo de Esperanto"). Sekve, vi alklakas sur "copier" en la menuo de via foliumilo kaj fine vi povas alkaki "coller" en la menuo de tekstprilaborilo (kiel Microsoft Word ekzemple). Nun vi havas vian tekston sur via propra komputila dokumento kaj vi povos ŝanĝi ĝin, kiel vi volos por plibeligi ĝin !

Daniel Schöni Bartoli

**Ekskurso 2007:
Semajnfino enĉaleda**

de vendrede, la 22-an ĝis dimanĉe, la 24-an de junio 2007.

La ĉaledo konstruita de la nedrinkantaj fervojistoj kaj nomita "Nia rifuĝejo - Notre Abri" posedas 30 litojn, en ĉambroj kaj en dormejo. Ĝi superas la lemanan lagon en la montoj super Montreux - Blonay - vidalvide al la Sonloup hotelo. Ĝi estas atingebla peraŭte kaj per trajne ĝis Chamby.

La Laŭzana Esperanto-Societo invitas vin partopreni tiun semajnfino. Jam rezervu tiujn datojn !

Ne forgesu, ke la Informilo estas **via ilo**. Dankon pro sendado al ni de viaj originalaj artikoloj, antaŭ la 10-a de majo. La redakcio

Klarigojn vi trovos en la venonta Informilo antaŭ la fino de majo.

Ni plezuriĝas vidi vin antaŭ-somere en "montaraj antaŭ-ferioj".

Amike via.
La LES-komitato.

Nous avons le plaisir de vous annoncer notre

Excursion 2007 :
Fin de semaine au chalet
du vendredi 22 au dimanche 24 juin 2007.

Le chalet compte 30 lits, en chambre et dortoirs. Il domine le Léman au-dessus de Montreux, et on s'y rend en voiture ou en train par Chamby.

La Société lausannoise d'espéranto vous invite à venir passer cette fin de semaine avec nous. Réservez déjà ces dates !

Vous trouverez des explications dans le prochain Informilo avant la fin du mois de mai.

Nous nous réjouissons de vous voir avant l'été pour des "avant-vacances".

Amicalement vôtre.
Le comité de LES.

Laŭzana Esperanto-Societo

Lunde la 7-an de majo 2007

je la 20-a en la salono unua etaĝa de la stacidomo CFF en Laŭzano.

Ni interparolos kaj espereble kverletos pri diversaj zamenhofaj proverboj. (Dominique kaj Elisabeth de Mestral animos)

Nous échangerons et nous chamoillerons peut-être à propos de quelques proverbes (animation: Dominique et Elisabeth de Mestral)

Kalendaro 2007

- lun 07/05/07 Pri diversaj zamenhofaj proverboj (*)
 - 23-25/06/07 Enĉaleda semajnfino (legu paĝojn 4+5)
- (*): en la stacidomo de Laŭzano ĉe la unua etaĝo, super « La Bufedo » je la 20-a

Laŭzana Esperanto-Societo

Société Lausannoise d'Espéranto

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22

+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 657 14 56

esperanto@isuisse.com http://www.esperanto.ch/Lausanne

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

TEMARO

Kaserolaj "Babetbabilajoj":	
Fumigita fiŝa ŝaŭmaĵo aromigita per freŝa aneto (eo)	2
Malkovru la retan esperanton (eo)	2
Semajnfino enĉaleda / Fin de semaine au chalet (fr+eo)	4

Kaserolaj "Babetbabilajoj"**Fumigita fiŝa ŝaŭmaĵo aromigita per freŝa aneto**

Ankaŭ se vi ne estas tre kuirema vi povos facile kontentigi viajn gastojn per tiu bona recepto.

Vi povas pretigi tiun ŝaŭmaĵon antaŭe kaj lasi ĝin 1-2 tagojn en fridujo.

Aneto (aneth): *anethum graveolens*. Umbeliferaco. Devenas de la greka "anêthon" kiel por anizo kaj *graveolens* elvenas de la latina "gravis" = peza, forta kaj *olens* = aromi, do tiu vorto signifas: kiu forte odoras.

Unue ĝi kreskis ĉirkaŭ la Mediteraneo kaj en Azio. Israelanoj kultivis ĝin en legomaj ĝardenoj. Jam antaŭ 5000 jaroj Egiptanoj kultivis ĝin kiel kuracan planton, Grekoj kaj Romanoj uzis ĝin por ellabori parfumojn, en kuirado kaj por ĝia kuraca efiko. En niaj ĝardenoj ĝi bone alklimatiĝas.

Ĝiaodoro memoras pri fenkolo. Oni uzas ĝin por solvi digestajn problemojn (aerofagio), ĝi estas ankaŭ kvietiga, trinkata en infuzaĵo antaŭ dormo kaj pliiigas lakton en mamnutrado.

Hodiaŭ ĝi estas multe uzata en Skandinavio por diversaj fiŝaŭcoj kaj por konfitado de kukumoj (umbelaj fruktoj).

Kvantoj por 4 personoj

kafkulero = k.k.
supkulero = s.k.

- 300 g. fumigita fiŝo (truto, salmono au fiŝoj de nia lago)
- 2 k.k. mustardo (gustumu laŭ ties forto)
- 3 ŝalotoj
- 1 dl kremo (aŭ 1-2 s.k. da migdala pureo kun 1dl akvo por tiu, kiu ne deziras uzi laktaĵojn)

- 3 s.k. blanka kirlita fromaĝo
- 2-4 s.k. citronosuko laŭ gusto
- 5 freŝaj branĉetoj de aneto aŭ saŭvaĝa fenkolo kaj lasu 1 branĉeton aparte por ornami

Preparo

Senŝeligu ŝalotojn kaj tranĉu ĉiujn en 5 erojn. Elprenu la lavitajn foliojn de aneto el la centraj branĉetoj kaj iomete haku ilin.

Forprenu la haŭton de via fiŝo. Por tio: kuŝu la fiŝon sur la senhaŭta parto kaj helpe de tranĉilo glitu la klingon inter haŭto kaj karno. Tio estas facila.

En miksilo deponu ĉiujn almiksaĵojn kaj pureigu vian mason. Gustumu kaj aldonu pli da likvaĵo se necese: kremo, citrono, mustardo laŭ gusto, ĝis vi ricevos la deziratan kunteniĝon. Vi devas formi buletojn, kiuj ne dispartiĝas.

Plenigu pasteĉoterpoton kaj deponu supren kelkajn disigitajn foliojn de aneto.

Lasu en fridujo dum 3 horoj.

Servu ĝin kun krakanta freŝa pano kaj salato.

Trinkaĵo: blanka vino "Chasselas" de nia regiono, "Riesling" de Alsaco aŭ "Sauvignon" de la "Loire".

Je via sano kaj bonan apetiton!
Elisabeth de Mestral

Daniel proponas al ni serion de artikoloj pri esperanto en la reto.

"Malkovru la retan esperanton"

Ekde kelkaj jaroj la reto donas novan energion al nia lingvo. Ambaŭ estas iloj por komuniki translandlime: la reto zorgas nur pri la tekniko, sed la internacia lingvo donas la eblon vere sin interkompreni.

Pasvorto: Kelkfoje vi devas skribi sekretan vorton por eniri paĝaron aŭ malfermi dosieron. Tio estas pasvorto.

TTT-Paĝaro: Esperante, WWW (World Wide Web) iĝas TTT (Tut-Tera Teksaĵo). TTT-Paĝaro estas do retejo de pluraj retpaĝoj.

Plenumebla dosiero: Tio estas programa dosiero. Kiam vi alklakas ĝin, ĝi komencas labori laŭ ĝia programo.

Serĉilo: Tio estas retpaĝo, kiu helpas vin trovi informojn. La plej konata estas "Google", kion vi povas ankaŭ uzi esperante ĉi-tie: <http://www.google.com/intl/eo/>

Foliumi: Vi foliumas, kiam vi iras de paĝoj al paĝoj. Eblas foliumi dum horoj sur la reto.

Foliumilo: Tio estas la ilo uzata por trovi la retpaĝojn. La plej konataj estas Internet Explorer kaj Firefox, sed ekzistas multe da aliaj.

Se vi volas aŭ bezonas lerni pli da esperantaj komputilvortoj, vi povas alklaki ĉi-tie: <http://www.esperanto.be/vortaroi.html>

Mi estas certa, ke vi trovos tre mirigajn aferojn per via komputilo, kaj mi nepre devas doni nun unuan ekzemplon. Jen: la reto permesas ankaŭ multajn originalajn serĉmetodojn, kiel vi povas legi ekzemplon en tiu artikolo de Sten Johansson: http://www.esperanto.org/Ondo/L-sten_i.htm. Li serĉas, kiaj vortoj estas la plej uzataj, ekzemple inter "olda" kaj "malnova", kaj ankaŭ aliajn lingvajn aferojn. Estas preskaŭ ludo, sed interesa ludo.

Eble estas unuafoje, ke vi provas legi artikolon el la reto. Se vi preferas legi tion surpapere, vi povas fari kiel mi: vi

Komprenoble la junuloj ŝatas uzi komputilon kaj malkovri la retejojn de diversaj esperantistoj. Por aliaj esperantistoj la reto estas ofte nur nova skriba komunikilo per retmesaĝoj.

Ekde tiu n-ro de la Informilo, mi proponas al vi la malkovron de kelkaj ebloj esperantumi kaj esperantiĝi per rete. Mi skribos artikolojn pri butikoj, komunikiloj, retejoj plenaj de senpagaj tekstoj kaj libroj, vortaroj, ĵurnaloj, retejoj de kluboj, muzikistoj kaj kelkaj gravaj paĝaroj. Ĉiujn eblojn el tiu listo vi povas uzi per via tute normala komputilo. Estas tiel multe da ebloj sur la reto, ke estus bedaŭrinde ne uzi ilin.

Enkonduke mi devas proponi al vi iomete da vortaro por pli bone kompreni la aferon. Se vi konas senprobleme vortojn kiel "retadreso, presi, retmesaĝo, paĝo, retpoŝto, programo", vi devos eble malkovri la sekvantajn vortojn, tre utilajn sur la reto:

Alklaki: Vi alklakas, kiam vi premas sur via komputilmuso por funkciigi ion.

Menuo: Tio estas listo, en kiu vi povas elekti, kion vi volas kaj alklakas. En programoj, vi normale ĉiam trovas menuojn.

Ligilo: Ligilo estas teksto sur la paĝo, sur kion vi povas alklaki por iri al alia paĝo.

Dosiero: Tio estas elementa dokumento, kion vi trovas en via komputilo. Ekzistas programoj, dokumentoj, muzikdosieroj, ktp. Kiam vi alklakas sur dosiero, vi malfermas ĝin.

Elŝuti: Tio estas tre grava retvorto. Vi elŝutas, kiam vi venigas dosieron de alia komputilo en vian.